



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 9 Septembro, 2012

Kara Leganto, antaŭ viaj okuloj nun estas la unua aŭtuna postkongres(oj)a numero de nia bulteno, ĝi estas resumaĵo de 4 (!) loka kaj internaciaj E-forumoj, kiuj okazis somere sur tri kontinentoj: LK en Usono, Eŭropa kunveno en nia irlanda ĝemel-urbo Galivo, faka ILEI (E-instruistoj) kaj UK (ambaŭ en Azio). Oni devas aldoni, ke la lasta, aŭgusta kunsido de E-societo donacis al partoprenintoj renkonton kun s-ano Johano Bradner – E-isto de 1972, kiu dum 25 (!) jaroj ne kontaktis kun gesamideanoj, sed lia sinprezento estis elbuŝigita flue kaj glate. Baldaŭ li preparos rakonton pri sia vivosperto. Kaj nun revenu al niaj ŝafoj, t.e. – al someraj E-forumoj.

–La Redakcio

Usona Kongreso en Dalaso

Kiel tutnova membro de E-USA mi la unuan fojon partoprenis ĝian LK-on, kiu ĉi jare okazis en Dallas (Teksaso) fine de Junio. Kiel kongresejo servis tre konvena ejo (kampuso) de la Universitato de Teksaso en Dallas, situanta en la antaŭurbo Riĉmondo. La kongreso estis perfekte organizita fare de dediĉoplana LKK kaj pasis tre glate kaj interese. Ni loĝis modeste, sed konvene en la nuntempaj novaj studentejoj, ĉiu havis propran ĉambron en triĉambra loĝejo. Dum la forumo ni estis plenrajtaj universitatanoj, povante uzi ĉiujn modernajn universitatajn instalaĵojn: libraron, sportejon, interreton, manĝejojn kun senlimigitaj manĝaĵoj. Krom la oficialaj kunsidoj la programo estis riĉa je kulturaj eventoj: koncertoj, prezento de E-filmoj, okazis eĉ dancoj, komuna kantado, bankedo, diskutoj kaj privataj konversacioj. Dum la kongreso aperadis ĉiutaga plenkolora bulteno kun kongresa slogano “Estonten!”. La kongreson partoprenis pli ol 100 gesamideanoj de diversaj usonaj ŝtatoj (mi estis unusola



ŝikagano), krome ankaŭ ĉinino kun sia filo, kiuj venis el Hispanujo, svedo, germanino, usonaj polo kaj kubano.

Ni ekskursis al loka sinagogo kaj centro de la urbo, kie finfine realiĝis mia revo: propraokule rigardi la scenejon de la fama mortatako kontraŭ Prezidento Kennedy, okazinta la 22an de Novembro 1963. Mi atendis preskaŭ

duonjarcenton por havi la okazon ekstari ĉe la fifama fenestro, de kie la mortpafoj estis farataj. Tiun lokon mi vizitis kun s-ino Spomenka Ŝtimec (renoma E-verkistino, naskita en iama Jugoslavio), kaj ni kune rememorigadis strangajn historiajn faktojn, ke la pafago de iu nerespondeca individuo povas ŝanĝi la mondhistorion, kiu okazis ankaŭ en Sarajevo (pafis Gavrilo Princip’), kio tiel forte influis je sorto de Eŭropo per sekvanta mondmilito.

Kvankam E-movado estas forte ligata al pasinteco, ni, la nuntempaj (usonaj) E-istoj pensu forte pri la estonteco de la movado kaj koncentrigu streĉojn por resti fortaj kaj utilaj al la nuntempa mondo.

–Les Kordylewski

Eŭropa Esperanto-Unio Kongresis Irlande

En irlanda urbo Galivo – ĝemelurbo de Ŝikago – okazis inter la 16-a kaj 20-a de Julio IX-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio sub la aŭspicio de la irlanda ŝtatprezidanto Michael D. Higgins. Estis malgranda kongreso kun nur 157 partoprenantoj, sed el respektinda nombro da landoj (28), ĉefe eŭropaj, sed ankaŭ venis partoprenantoj el Kubo, Brazilo, Japanio kaj Usono.

Laŭtenhave temis pri tre riĉa kongreso, kies ĉefa parto estis 11 prelegoj rilataj al la kongresa ĉeftemo “Lingvolernado en EU – lerni pli, kosti malpli”. La prelegtemoj rilatis al la lingva situacio kaj lingvolernado en Irlando kaj al la propedeŭtika rolo de Esperanto en lingvolernado.

Inter la prelegantoj estis tri neesperantistoj: fakuloj pri la irlanda lingva situacio. Kaj ĝuste pro tiu ĉi temaro ankaŭ la finkonkludoj de la kongreso estis turnitaj al la irlanda registaro.

La kongreso interalie decidis rekomendi, ke Irlando



dum sia prezidado de EU en 2013 aldonu multlingvismon al siaj prioritatoj. La kongreso ankaŭ proponis, ke la EU-Konferenco pri multlingvismo, okazanta en Kipro nun, diskutu kiel praktike progresigi la rekomendon de la Civilsocio Platformo en la sekcio pri edukado, nome esplori, kiu unua fremda lingvo en la lernejo pleje kuraĝigas la lernadon de plia fremda lingvo. Krome la programo abundis per aliaj eroj: literaturaj prelegoj, pri historio de Irlando, irlanda eksprese, pri TEJO, pri Tibor Sekelj pri la cigana lingvo, pri progreso de Esperanto en Pollando ktp.

Siajn kunvenoj havis fakaj asocioj: juristoj kaj ĵurnalistoj. Ankaŭ la kultura programo estis riĉa: Nacia vespero kun kantoj kaj dancoj irlandaj, du teatraj vesperoj. Handzlik partoprenis en kanzonkoncerto kune kun JoMo.

La estraro de EEU decidis, ke la sekva 10-a kongreso okazos en julio 2014 en slovakia urbo Nitra. –Zlatko Tišljak

Usonano Kongresumas en Azio



Dum Julio 2012 mi partoprenis du gravajn internaciajn konvenojn de Esperantistoj, ambaŭ en Azio. Tio estas grava fakto, ĉar ĝi indikas ke Esperanto nun iĝas ĉiam pli tutmonda. Ankaŭ multaj Esperantistoj en Eŭropo kaj Norda Ameriko nun iĝas maljunaj, sed en Azio (kaj Latina Amerika) multaj el ili estas gejunuloj. En la kongresejo oni vidis multajn junajn vjetnamiajn Esperantistojn. Alia interesa fakto estas, ke la registaroj en Ĉinio kaj Vjetnamio evidente forte subtenas Esperanton. Mi eĉ eksciis de unu prelego dum la UK, ke Ho Chi Minh ("Onklo Ho"), gvidanto de la revolucio en Vjetnamio, scipovis kaj uzis Esperanton!

La 45-a konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunvenis la 20-an ĝis la 26-an de Julio ĉe la Profesia Artkolegio de Kunming, Yunnan-Provinco, Ĉinio. Dum la konferenco ni dufoje ĝuis la kantadon kaj dancadon de la talentaj studentoj de tiu kolegio. Je la fino de la adiaŭa programo ni eĉ havis pireteknikaĵojn. Profesorino Gong Xiofeng (Arko), Universitato de Nanchang, prezidantino de la Ĉina Sekcio de ILEI, bonege estris la ILEI-konferencon. Al la konferenco el 19 landoj venis 104 instruistoj, inkluzive de 65 el Ĉinio kaj 9 el Nepalo.

Je la 27-a de Julio, 44 Esperantistoj eniris grandan aŭtobuson kaj veturis dum dek horoj al la landlimo de Vjetnamio. Ni devis porti niajn valizojn trans longa ponto kaj poste atendi la agadon de la iom malspertaj vjetnamiaj doganaj oficialuloj. Ni ankaŭ devis atendi dum pli ol unu horo pro la fakto, ke unu el niaj instruistoj el Rumanio ne havis vizon, ĉar ĉina funkciulo erare antaŭe informis ŝin, ke ŝi ne bezonas ĝin. Tio estus la situacio nur se oni enirus Vjetnamion ĉe la flughaveno en Hanojo. Feliĉe ĉina funkciulo solvis la problemon, eble per la preteksto, ke ŝi ne bezonis vizon ĉar ŝi estas diplomato. Pro la lingvo problemo ni ne scias precize tion kio okazis.

Post kiam ni estis en Vjetnamio, kvin primativaj busoj transportis nin al la stacidomo por trafi la trajnon al Hanojo. Ĉar estis la deka horo ptm en Vjetnamio kaj la naua horo ptm en Ĉinio, ni povis senprobleme trafi nian noktotrajon al Hanojo (ses litoj por ses homoj en ĉiu kupeo). Matene ĉe la stacidomo en Hanojo estis multaj taksioj, kiuj estis pretaj akcepti ĉinan monon por veterigi nin al nia Hotelo Hoabinh, sed ĝi ne estis la kongresejo por la 97-a UK. Sekve Vilĉjo Harris kaj mi ĉiutage devis marŝi duon-mejlon en tre varmega, humida vetero laŭ neglataj trotuaroj al la kongresejo.

La kongresejo Hotelo Melia estis bela kaj luksa konstruaĵo, sed tamen ekzistis du grandaj problemoj. Unue, ĉio en tiu hotelo estis tre altakosta rilate al la prezoj en aliaj lokoj. Due, tiu hotelo ne havis sufiĉe grandan ĉambron por la 800+ partoprenantoj, kiuj ĉeestis la plej gravajn solenajn eventojn kaj vesperajn programerojn! Tial por tiaj eventoj ĉiuj devis uzi grandajn busojn por veturi dum 25 minutoj al universitato, kiu havis tian salonon kaj poste dum alia 25 minutoj por reiri al la kongresejo.

La kongresa programo estis simila al la kutima. Miaopinie, la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato estis iom pli bonaj ol kutime. Ankaŭ estis interesaj diskutoj pri kiel oni povus evoluigi Esperanton por ke ĝi estu pli facile lernebla de azianoj. Ŝajne ekzistas nur malmultaj vortoj komunaj al la diversaj aziaj lingvoj, sed oni devus kunmeti esperantajn radikojn por krei pli longajn vortojn, anstataŭ uzi vortojn el la helena kaj latina lingvoj, vortojn, kiuj estas konataj al eŭropanoj sed ne al azianoj.

Mi opinias, ke estis tre bona ideo okazigi ĉi UK-on en Azio, sed mi ankaŭ opinias, ke estas bone okazigi la UK-on en Rejkjaviko (2013), Islando kaj en Bonaero, Argentino (2014).

–Ronald Glossop

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

25an de Septembro – Tradukseminario (gvidas Gregoro kaj Viktoro)

23an de Oktobro – Prezidanta horo

26an de Novembro – Uzbekaj novaĵoj de Andreo Kolganov

16an de Decembro – Zamenhofa Festo en Fiŝista Nesto